Bolanta Kaldrono

INFORMILO 277 de la
Esperanto - Grupo Bremen
Oktobro - Novembro 2005

Sekr: D-ro Hans Walter Krüger, Dordrechter Str 36, 28259 Bremen, Tel: 0421 561943
Informoj: Prezidanto OstR Hellmut Grebe, Tel: 0421 3963480
Kasistino: Ruth Bohn, Tel: 0421 382715
Red: Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 HB, Tel/Fax 8476806, hartig.hd@t-online.de

Vizitu nin en Interreto: www.esperanto.de/bremen

Dort präsentieren wir unser aktuelles Programm und unsere Zeitung Informilo

>>>>>>>>>>

A T E N T U !! Nia kunveno la 7an de sept « Postferia kunveno »
>>>>> ne okazos!



Somero - aŭtuno,
feliĉaj ferioj.
La vino kreskas preskaŭ rikoltpreta;
ne preterlasu gustumi la vinon!

Nia Programo:

La 7an de septembro:	Atentu!! Tiu kunveno ne okazos, ĉar la plej multaj membroj ankoraŭ ferios.
La 12an de oktobro	Diskuto pri aktualaĵoj. Hans-Walter Krüger prelegos pri: Ĉu la evolua stagnado signifas malprogreso?
La 09an de Novembro	Lingvaj studadoj. Proparos (Kurt), Hellmut kaj Franz.
La 7an de decembro	Zamenhoffesto. Ĉijare ĉe familio Hartig

Retrospegulo

La 26an de junio s-ro Fischer estis en Bremen.

Lisa kaj Dieter Hartig renkontis lin en la Intercity-hotelo. Ĉeestis ankaŭ s-ino Fischer. Estis tre agrabla rondo en la tiea gastejo. Ni memoris pri lia ĉeesto en nia kurso kune kun s-ro Schlepper. Ni kalkulis kaj venis al la rezulto, ke intertempe pasis 28 jaroj. Mi dankis al li, ke li tiel fidele restis en konekto kun nia grupo kaj eĉ finance subtenis niajn klopodojn.

S-ro Fischer tiuvoje salutas ĉiujn membrojn tre kore.

Dieter Hartig

La 06an de Julio, Nia Ĝardenfesto.

Somera tempo signalas feriojn.....kaj la eventon de nia tradicia ĝardenfesto! Nunjare Ruth Bohn kaj Waltraud Bohl organizis la feston sur la beleta ĝardenparcelo “Persikoflora Vojo” kaj dispongis trinkaĵojn, salatojn ktp., laŭ la kutimo la gastoj ja mem kunportas rostaĵojn. Oni nur povas konstati: pli ol sufiĉe! Bedaŭrinde entute nur 7 plenkreskuloj kaj 2 infanoj partoprenis.

La Krüger-ĝemeloj rapide sentis sin bone, ĉar ili ankoraŭ estis spertaj pri la tereno kaj gaje ekludis.

Kiel ofte la pluvo ne lasis nin atendi, sed la tendo sufiĉe ŝirmis la kunestantojn. Baldaŭ stimula interbabilado ekestis....., finfine certe ĉiuj partoprenantoj kunsentis:

“Koran Dankon por la agrabla gastema kunveno!”

Hans Walter Krüger

Ni rigardu trans niaj limoj.

GEA 100-jara Jubileo de Germana Esperanto-Asocio.
La 19an de majo 1906 estis fondita en Braunschweig la "Germanlingva Esperantista Societo".

Ni intencas fiere festi nian centjariĝon per 83a Germana Esperanta Kongreso en Braunschweig la 2 – 5-an de Junio 2006.

Ni iru tien kaj auskultos la prelegojn de D-ro Detlev Blanke, D-ro Werner Bormann, D-ro Ulrich Lins kaj Prof. Erich-Dieter Krause.

Profitu la vojaĝon por resti iom pli longe kaj viziti la aŭtomobilcentron en Wolfsburg, ferii en la regiono Harz aŭ restadi kelkajn tagojn en la vivoplena ĉefurbo Berlin.

Aliĝilojn haveblaj ĉe Christian Darbellay, Kaiserstr. 39, 24143 Kiel. Tel. 0431 73 77 88.

Letero el Columbus, Ohio, Usono.

Niaj geamikoj sendis salutojn al ĉiuj membroj de nia grupo.

D-ro Robert Dartau dankis mian raporton pri nia grupa vivo. Precipe plaĉis al la grupanoj en Columbus la informila raporto pri la "stormskuita kunveno" en Rodenkirchen. La sukceson de tiu kunveno meritas niaj geamikoj el la Esperantogrupo Unterweser.

La periodaĵon ĝis la Julio-eldono niaj geamikoj sendis intertempe al ni. Ilia Informilo nomiĝas "Ligileto", Estas tre trafa nomo, ĉar ĝi, same kiel ĉe ni, ligas la esperantistojn kaj la interesitojn.

Li raportis pri "Komputilproblemoj". Evidente, temas pri internacia malsano. Do, kiu okupiĝas pri komputiloj, tiu havas ankaŭ problemojn.

Ni salutas ĉikune la grupanojn en Columbus tre kore.

Sufiĉe konata esperantisto mortis la 3-an de Aŭgusto.
Ni tre bedaŭras la forpason de s-ro
Willi Brandenburg
kaj kondolencas sincere.
S-ro Brandenburg agis kiel ekzamenanto en la kursfinaj ekzamenoj en nia grupo.

Dieter Hartig

Komputil – manipulado

Ĉu mankas al vi veraj problemoj??

Tiam mi konsilas al vi havigi komputilon!!

Komputil-kliniko establiĝis proksime, en superbazaro.



Jen atendas konstante klientoj vicestarantaj.

Ĉiu el la klinentoj havas nevenkeblajn problemojn kaj aspektas tre nervozaj.

Ili ja severe klopodis kaj gratis la kapon – vane! La kapon ili jam perdis.

Simile okazis al mi:
Mi ja ne perdis la kapon, mi do povis grati ĝin. Nur mia karulo estis ŝokita pri la konduto de mia komputil-instalaĵo.

Hejmenveninte mi konstatis dikan inkmakulon sur koverto. Konsternite mi vidis. ke el la presilo fluis nigra inko. Trans la librobreto, sur kiu la presilo staras, fluis delikataj nigraj strioj.

La inkpatrono difektiĝis! Unue mi metis la presilon en plastikan saketon. Por estingi sekure la inkfluon mi aldone metis ĝin en plian saketon. Poste ni malmuntis la meblon. Lisa kaj mi severe purigis la nigran superfluitajn partojn; forĵetis ne plu uzeblajn paperfoliojn. Prefere mi ne ripetu, kion mia kara Lisa grumblis. Sed ni sukcesis kontentige purigi la ŝrankon.

Por daŭrigi la Informil-produktadon mi aĉetis novan presilon. Sed la komputilo evidente ne ŝatas la novan ilon. Ĝi rifuzis labori.

Mi klopodis diversmaniere gvidi ĝin al ago, mi karesis ĝin, mi minacis ĝin per martelo sen ia sukceso.

Mi konsultis la supre menciitan specialiston. Li rigardis la kompitilon dirante: "Tiu dinosauro ne rajtas vivi ankoraŭ!"

Mi helpopetis nian bofilon. La komputilo funkciis antaŭ lia alveno. Li ja forigis la eraron. Sed nun ĝi ne plu funkciis! Fulmotondro!!

Pri tiaj problemoj vidu supre.

Dieter Hartig